

& La Promesoj de l' Kandidato:

< Rekante 21 el 41 batoj por strofo, entute 533 paŝoj dum 6 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929) kun enkonduko: (Melodio: "Ah, mesdames, voilà du bonfromage!"). Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo. Klarigoj (*): '6 Mallongigo de Société Française Pour l'Espéranto. '12 Franca ministro pri edukado kiu malpermesis en lernejoj Esperanton instrui.>

(#Melodio:

<:41> (/mimi soso somi redo mimi; rere fafa fafa fami redo;do mimi mido LaSo do; miso soso soso sofa mire do;

(#Rekantaĵe: reerere remi rere rere TiLa So do; reerere remi rere mifa so ti so; reerere remi rere rere somi re do o)

)×13)+

(&Strofoj:

'1 /Mi de longe estas favoranto ; De la bela lingvo Esperanto, ; Mi eĉ intencas lerni ĝin, ; Se ĉe la baloto vi elektos min!

(×:; **Esperantistoj paŝu post mi en la ĉeno! ; Certe profitos ni per tiu ĉi beno ; Esperantistoj paŝu post mi en la ĉeno!**)

'2 Mi ne estas fremda plu pri tio, ; Ĉar en mia propra familio ; Iu kuzino aŭ onklin' ; Jam kun Esperanto ofte tedis min.

'3 Ankaŭ mi persone vin subtenis ; Kaj aktive ofte partoprenis ; Ĉe... festbankedo, kie min ; Speciale ravis via ĉampanvin'!

'4 Mi promesas al vi je l' honoro, ; Ke mi tuj komencos per laboro, ; Kaj post dek jaroj, se ne pli, ; Nepre certe estas, ke triumfos vi!

'5 Mi proponos en la parlamento, ; Ke l' importo de la Nova Sento ; Estu senpaga ĉe l' dogan', ; Se ĝin antaŭpagis la samidean'.

'6 Ni dekretos, ke l' dimanĉesperon ; la infanoj kantos la Esperon ; Dum la aliaj kantos, ke ; Dio progresigu la S. F. P. E.*

'7 Mi promesas al la delegitoj, ; Kiuj havas tiom da meritoj, ; Kiuj zorgadas pri l' movad', ; Iom da sukero aŭ da ĉokolad'.

'8 Kaj ni liberigos – sen rezervo – ; Ĉiun viron de l' milita servo, ; Se tiu ĉi per Esperant' ; Ĝustatempe kuris al transmara land'.

'9 Mi solene min jam nun proponas, ; Se okaze iun vi bezonas, ; Iun por esti laŭ konven' ; Protektora prezidanto ĉe festen'!

'10 Kaj mi ĵuras sur la Kata Vosto, ; Ni vin liberigos de imposto, ; Eĉ de malsan' kaj tiel plu, ; Se vi portas stelon en la butontru'.

'11 Kaj por ĉiu al-kongresveturo ; Vi komforte sidos sur veluro ; De plej moderna luksa klas', ; Ĉio je la kosto de l' kongresa kas'!

'12 Kaj mi ĵuras sur la Fundamento, ; Ke sur pinto de la Parlamento ; Flirtos la Esperanta flag', ; Por Berardo* tio estos bona blag'!

'13 Nun por fini tiun ĉi enketon ; Mi humile al vi faras peton: ; Ke vi ne publikigu ĝin, ; eble la idistoj ne elektus min!...)